

Annette von Droste-Hülshoff,  
Lastaj vortoj (2)

*tradukita de Manfred Retzlaff*

*2a versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru vi;  
Ĉar lumas jen en paco Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj doloro  
Mildigon volas peti mi.

Se venas kun flugilo sia  
La nokta paco al la Ter',  
Ne pensu plu pri tombo mia,  
Salutas mi el stela sfer'.

...

Annette von Droste-Hülshoff,  
Lastaj vortoj (1)

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

*1a traduk-versio*

Karuloj, kiam pasis mia  
Spirit', pri mi ne ploru vi;  
Ĉar lumas jen en paco Dia  
Eterna tago ja al mi.

En tiu senaflikta foro  
Memoru daŭre mi pri vi,  
Por viaj vundoj kaj doloro  
Mildigon volas peti mi.

Se nokte per flugilo sia  
Pac' tuŝas tiun mondon ĉi,  
Ne pensu plu pri tombo mia,  
Vin de l' stelar' salutas mi.<sup>2</sup>

...

---

<sup>2</sup>aŭ: Ĉar de l' stelar' salutas mi.

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 2004-05-16.*

*MR-311-5 / Arg-160-474 (2004-05-16 13:52:23)*

*La trian strofon mi, Manfred Retzlaff, ŝanĝis iom laŭ la modelo de la traduko de Josph Ferdinand Berger, uzante ankaŭ la rimvortparon "Ter' - sfer". En mia unua traduko-provo de l' 26.08.1997 resp. de l' 15.05.2004 mi iom tro ofte uzis la rimvortojn "mi, vi, ĉi". Tio certe ne estas tre bona solvo kaj efikas iom ĝena.*

*Traduko de la Germana poemo "Letzte Worte" de ANNETTE VON DROSTE-HÜLSHOFF (\*1797-01-10 – †1848-05-24) en Esperanton de MANFREDO RATISLAVO (Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, \*1938-11-04) en 2004-05.15.*

*Arg-160-316 (2004-05-16 13:55:41)*

*La origina versio de tiu ĉi poemo estas laŭ informo de l' 06.02.2003 fare de d-rino Edda Baußmann de la societo "Annette von Droste-Hülshoff" (Am Haus Rüschaus 81, D-48161 Münster/Westfalen, Germanio, baumann@drostegesellschaft.de, www.droste-gesellschaft.de) ne verkita de la poetino mem sed de ŝia nevino Elisabeth, post ŝia morto.*